

N-ro 79 **1989-3 Decembro** **21-a jaro**

Informilo de Esperanto-Ligo Filatelista
Faka asocio en UEA





FILATELA EKSPOZICIO
Memore al 40—jariĝo de liberiĝo de Nanchang



































Informilo de ELF/AREK
Esperanto-Ligo Filatelista
Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj

Prezidanto-Kasisto:	I.Paulsson, Skytteholmvägen 29 S-171 44 Solna
Stampobanko:	W.Heimlich, Fröbelstr. 4, D-3040 Soltau
Kotizo 1990:	60 SEK (10 USD aŭ 20 irk.)
Redakcio ĉe:	R. Burmeister, W.-Firl-Str. 30 Karl-Marx-Stadt, DDR-9047

Kotizo! Nia Paulsson atentigas kaj petas pri rapida alsendo de la 1990-a kotizo (UEA-konto elfx-r).
Rapida informo! Informojn pri novaj stampoj kaj glumarkoj, laŭeble kun kopioj aŭ originaloj sendu al la redaktoro tuj post apero. La ĉinojn mi petas aldone informi pri urboj, kaj, ĉu temas pri asociaj aŭ poŝtaj kovertoj kaj stampoj.

***

Adresaro: La adresaron kompilis nia Radnai. El la 144 notitaj membroj triono ne pagis kotizon por 1989! Duono el ili neniam kontaktis la redaktoron por sendi iujn sciigojn. Tre bedaŭrinda afero. Mi komparis ĝin kun miaj notoj kaj konstatis plurajn fuŝitajn adresojn aŭ eĉ mankantajn. Sube mi notos la korektojn. Se vi konstatas pliajn mankojn, bv. sciigi tiujn al la redaktoro. Estonte certe ne plu eblas pro financaj kialoj aperigi adresaron, tial mi proponas atente sekvi la informojn pri novaj membroj en nia *LVL* kaj fari mem tian suplementan adresaron.
Aldonu:
Josep Cervello, Carrer Sant Quirze 23, 2a-2, Terrassa, Hispanio. Li kolektas i.a. Esperanto-glumarkojn.
Catina Dazzini, Via Palestro 36, I-54100 Massa.
Santiago Alvarez G., Apartado aero 54-800, CO-Bogotá 2, Kolombio.
Ba Jingke, Changii shi Jiaoshi Jin, Xiu xuexiao, TJ-831100 Xinjiang.
Zhu Bao Long, 41 Huan cheng xi Lu, TJ-310006 Hangzhou.
Novaj membroj:
Bert Boon, Merelhof 8, B-3300 Tienen.
Ding Shihui, Di 7 zhongxue, Changde-Xian, TJ-415124 Hunan.
Forstreku:
Gemin, F-49150 Baugé (neniam aliĝis, nenion kolektas!)
Korektoj:

J. Vincent (s-ino), 26bis, rue Milngavie, F-49150 Baugé.
L. Kosieniak, PL-00539.
L. Vulfovič, Palehskaja.
Nova adreso:
Shen Minglun, Dexiangxiang 9, TJ-315020 Ningbo. Li deziras interŝanĝi Esperanto-filatelaĵojn. Povas sendi Esperanto-stampojn de urbo Ningbo.

***

Stampokatalogo: Nia kluba amiko Hirsch, kompilinto de la plej freŝdata stampokatalogo post reveno el hospitalo, sciigas, ke la unua eldono de 50 ekz. tuj estis elvendita. Nun li preparas suplementon kun korektoj kaj aldonoj. La prezo por la suplemento estos ĉ. 8 germanaj markoj. Krome li aperigos duan eldonon kun 30 ekz., kiu posedas jam ĉiujn korektojn kaj novaĵojn. Prezo estos la sama: 25 markoj. Aldone pagenda estas la afranko. Tuj sciigu vian mendon al sinjoro Hirsch.

***

Bonaj deziroj por Hirsch kaj Lindström: Ambaŭ niaj klubaj amikoj lastatempe havis gravajn operaciojn kaj longatempe estis malsanaj. Ni deziru al ili baldaŭan resaniĝon! Ĉion bonan por vi ambaŭ!

***

Danko: Mi kore dankas al ĉiuj klubaj geamikoj, kiuj helpis al mi kompili tiun ĉi numeron. Mi ne kuraĝas elstarigi iujn nomojn, ĉar ja eĉ eta bagatela informo estas por ni grava ekscio.

***

Redaktora vorto: La ĉinaj stampoj sur la titola paĝo posedas duonan grandecon. Ili ne estas kompletaj. Mi ne kuraĝas doni numerojn. Ilin vi trovos post finkompilo de la kataloga suplemento en februaro 1990. Jam mi posedas valorajn informojn por la sekva numero, ekz. pri Bela Kun kaj Ŝamil Usmanov, Esperantistaj viktimoj de la stalina teroro, pri Esperantaj moneroj kaj medaloj. k.a.

***

Feliĉan, sanan kaj pacan
jaron 1990
deziras al ĉiuj
viaj
I. Paulsson R. Burmeister W. Heimlich

***

Monumentaj bildkartoj: Sur 5 koloraj bildkartoj aperas Esperanto-monumentoj en Nederlando. Eldonitaj por subteni la Afrikan agadon de UEA. Haveblaj ĉe D. Goslinga, Biesbosstraat 24, NL-8226 EB Lelystad. Poŝtkonto 537731 kontraŭ 3,70 guldenoj inkl. sendokostojn.

***

LVL **serĉataj**: „Mi serĉas kontakton al esperantisto, kiu posedas *LVL* n-rojn 6, 8, 9, 12, 14, 17, 18, 20, 21, 22, 32-35. Anton Kronshage, Eulenweg 27, D-5830 Schwelm.".

***

300-dinaraj vendeblaj... ambaŭ aerpoŝtajn ofertas kontraŭ okcidenta valuto nia membro Mikulski (vidu adresaron!). Li atendas proponojn. Ankaŭ telefone: 27-73-35.

Kuba Esperanta Filatelaĵo de 1914

Por la 24a de februaro 1914 estis planita flugo de Cienfuegos al Havano. La aviadisto flugonta nomiĝis Jaime Gonzales Crozier (Yvert A 116). Por la flugo oni elektis monoplanon de la fabriko Morane Soulnier. La tiama prezidanto de la Esperanta klubo, s-ro Cuevas, presigis kvanton da memorigaj kovertoj kun tekstoj en la hispana, angla kaj Esperanta:
Meze: Avizo. Tiu ĉi letero estas portita aere, de Jaime Gonzalez, de urbo Cienfuegos al ĉefurbo Habana, hodiaŭ, la 24an de Februaro 1914, je monoplano „MORANE".
Maldekstre: Adreso tie ĉi.
Dekstre: Aera Poŝtvojo kaj Poŝtmarkoj tie ĉi.
Apud normalpoŝta tarifo de 2 centavoj necesis afranki pliajn 10 centavojn por ekspresa poŝto. Por tio oni prenis bluan markon (Yvert U 4) kiu montras la aviadilon MORANE (samtage aperinta).
Pro antaŭtaga provfluga akcidento, la flugo ne okazis kaj la tuta poŝto estis ekspresvagonare sendita al Havano. Estas konataj ankoraŭ 4 pecoj el tiuj kovertoj:
- du en la kolekto de la Kuba Poŝta Muzeo
- unu en la kolekto de Th. Champion (Francio)
- unu ĉe usona kolektanto (nomo nekonata).

Katalogita tiu koverto estas en *The American Air Mail Catalogue Cuba-Pioneer-Domestic & International Flights*, kompilita de Mark R. Tyx (Usono). La supraj informoj estas prenitaj el *Contribución al la historia de la aeronáutica y el correo aera en Cuba*. La Habana, *Museo Postal Cubano*, 1971, p. 208.

Koran dankon al nia kluba amiko HECTOR JUAREZ-FIGUEREDO, kiu multe pli detale informis pri tio. Antaŭ pli ol unu jaro mi ricevis de nia Richard Hirsch kopion pri kuba poŝtkarto (nominalo unu centavo) kun dorsflanke surpresita Esperanta teksto. Aperigis ĝin „Societo Kuba por la propagando de Esperanto". Ankaŭ ĝi estas Esperanto-filatela dokumento el la komenco de la kuba Esperanta movado, kiu temas pri la gazeto *Latinamerika Esperantisto*.




LATINAMERIKA ESPERANTISTO

Monata propaganda gazeto, oficiala organo de la Latinamerika Esperantista Ligo kaj de la Societo Kuba por la propagando de Esperanto. Ĝi estas eldonata hispane kaj esperante, kun belaj gravuraĵoj. Ĝi celas la disvastigadon de Esperanto en la hispanparolantaj popoloj el Ameriko.

La jara abono kostas tri spesmilojn (1.50 dolaroj aŭ ilia ekvivalento). Specimenan numeron kaj propagandan broŝuron oni sendas kontraŭ du respondkuponoj.

LATINAMERIKA ESPERANTISTO

APARTADO, 1324.—HABANA—CUBA













70a datreveno de la Kvara-Majo-Movado

La 4an de majo 1919 pli ol 3000 studentoj iris en Pekino sur la *Tiananmen*-placon por protesti kontraŭ la decidoj faritaj en la Pariza Pac-Konferenco. Honore al la 70a datreveno de la Kvara-Majo-Movado la MPT de ĈPR eldonis en la 4a de majo 1989 memorigan poŝtmarkon 8-fenan (J.158). La poŝto de Ninghai uzis memore tion Esperantan-hanlingvan stampilon, kiu portas la tekston:

70 JAROJ DE LA MOVADO JE LA 4A DE MAJO

Desegnis ĝin: Chen Minggang.

Dankon al Shen Minglun pro alsendo de la stampo.

***

Filatela ekspozicio en Nanchang

La 22an de majo 1989 okazis filatela ekspozicio memore al la 40-jariĝo de la liberigo de Nanchang. La urba poŝtejo tiutage uzis senfinan maŝinvarbstampon. En la tekstoparto troviĝas la teksto: FILATELA EKSPOZICIO / Memore al la 40-jariĝo de / liberigo de Nanchang. La datstampo posedas la nomon de Nanchang hanlingve kaj latinlitere kun la dato: 1989.5.22.2. Ekzistas memorkoverto kun Esperanta surpreso.

Dankon al Ding Shihui kaj Cao Xionglin pro la alsendo de la stampo.

***

100-jara jubileo de IPU

La 29an de junio 1989 IPU festis sian 100an naskiĝtagon. Memore al tio la MPT de ĈPR emisiis jubilean poŝtmarkon (J.159). Poŝtmarkaj kompanioj en tri urboj uzis memorigajn stampojn en la hana kaj en Esperanto:

- Kaifeng (Henan) LA CENTJARO DE FONDIĜO PRI ĈIUNACIA PARLAMENTA UNIO.
- Ma'anshan (Anhui) LA 100-JARA JUBILEO DE IPU
- Ninghai (Zhejiang) 100-JARA JUBILEO DE IPU

Desegnis (laŭvice:) Chen Feishi, He Qiheng, Chen Minggang. Dato: 1989-6-29.

Dankon pro senditaj informoj al Ĉin Kajĝi kaj al Shen Minglun.

***

Filatela ekspozicio de Bajingke

Okaze de la „2a datreveno de la fondiĝo de la filatela kaj Esperanto-asocioj" (hanlingve dekstre de la stampo kaj ujgure supre) la poŝtoficejo lige kun la filatela asocio de Changji eldonis ovalan Esperanto-stampon. Maldekstre en ĝi: FILATELA EKS DE BAJINGKE. Meze du tergloboj kaj: ESPERANTO K FILATELO. Sube la dato: 1989.7.26-28. Desegnis: Ba Jingke.

Dankon al Ba Jingke pro la senditaj informoj.

***

Inundo de Ninghai

Je la 30a de julio 1988 en la gubernio Ninghai (provinco Zhejiang) okazis granda inundo kiu prenis la vivon de 182 homoj kaj detruis pli ol 16 000 domojn. Kondolence al tio la kontraŭkatastrofa sekcio de Ninghai-registaro kaj la filatela ligo de Ninghai eldonis ilustritan memorkoverton kun porokaza stampo en Esperanto kaj en la hana: 1 JARO DE LA GRANDA INUNDO JE LA 30-A DE JULIO EN NINGHAI. Dato: 1989-7-30. Desegnis: Chen Minggang. Informis: Chen Minglun kaj Ĉin Kajĝi.

***

Konfuzeo

Je la 28a de septembro 1989 la MPTde ĈPR emisiis du poŝtmarkojn (J. 162)(8 f, 160 f) memore al Konfuceo. Li vivis de -551 ĝis -479 kaj estis ĉina filozofo, politikulo kaj edukisto. La filozofia kaj morala doktrino de li kaj de lia skolo, preterlasante ĉian metafizikon, celas al starigo de humana ordo. Laŭ EdE, p. 57, li parolis pri internacia lingvo (fonto ne citita).

Esperantigitaj verkoj:

- La vortoj de Konfucio, 1923
- Granda lernado k doktrino de mezeco, 1932
- La libro-konstantaĵo de fila pieco, 1933

„Konfuzio" estas Esperantigita el la latina *Konfuzius*, „Konfuzeo" el la hanlingva formo. Poŝtaj Esperanto-stampoj aperis en:

- Nanchang: „2540-a datreveno de naskiĝo de Konfuzio"
- Ninghai: „2540-A JUBILEA JARO DE KONFUZEO"
- Kajfeng: „2540-A DE LA NASKIĜO DE KONFUZEO"
- Changshu: „LA 2540 JAROJ DE KONFUZEO"
- Weihui: „LA 2540-A DATREVENO NASKIĜO DE KONGZI".

Laste du cititajn mi ricevis de s-ro Zhouziqi sen klarigoj. La du unue cititajn mi ricevis de niaj amikoj Cao Xionglin kaj Shen Minglun. Dankon al ĉiuj!

***

40 jaroj PRĈ

S-ro Zouziqi sendis poŝtkarton kun stampo „LA 40 JAROJ DE LA FONDIĜO DE PR ĈINIO". Dato: 1989.10.1. Urbo: Se mi ne eraras: Changshu. Kaj se mi ĝuste supozas, s-ro Zhang Linrui desegnis tiun ĉi kaj tiun supre cititan konfuzean stampon.

***

Turo de Princo Teng

La turo de Princo Teng estas simbolo de antikva civilizacio el la Tang-dinastio, konstruita en 653. Ofte detruita kaj rekonstruita, en 1926 militistaro tute cindrigis ĝin, en oktobro 1985 komenciĝis ĝia rekonstruo kiu estis finita en la 8a de oktobro 1989. Okaze de ĝia finrekonstruo la Nanĉang-Filatela Kompanio emisiis memoran koverton en la sama tago. Dorsflanke troviĝas han- kaj Esperantlingva klarigo. Esperantigis ĝin Gu Ĝjanma. La koverton desegnis (eble ankaŭ la stampon?) Guo Ling. La koverto montras la Tengturon. Dekstre surpresita Teng-turforma stampo-similaĵo kun dato 1989.10.8. La poŝtmarko de 10 fenoj eble ankaŭ montras tiun turon. (T.121) (4-3). Sur la poŝtmarko du stampoj: normala ds (poŝtkodo 330008) kaj surstampita „stampo-similaĵo". Dankon al Cao Xionglin pro la alsendo de la memor-koverto! Li sendis ankaŭ memorkoverton pri 40 jaroj PRĈ (dancantaj junulinoj) kun la Esperanta surpreso: Filatela Ekspozicio en Nanchang por la 40a jariĝo de Ĉinio, kaj saman memorkoverton, sed kun la surpreso: „Celebre al la 40-a jariĝo de la ĈPR".

***

2a kultur-arta festivalo

De Lu Chengzhi min atingis ne-Esperanta memorkoverto okaze de

„LA DUA KULTUR-ARTA FESTIVALO DE CHANGSHU", kiel tekstas la poŝta stampo kun la dato 1989.9.29. En la mezo la vorto „Cevi" kun birdo. Desegnis ĝin verŝajne nia Zhang Linrui, admirinda kaj ideoriĉa veterana esperantisto! Dankon al sinjoro Lu.

***

Filmo „La Espero"

1989.10.05 estis la tago, en kiu la televido-radio-stacio Qingdao elsendis la filmon „La Espero". La Poŝtmarka Kompanio kaj la Esperanto-Asocio de Qingdao eldonis Esperantan UTK kaj stampon. Ambaŭ desegnis s-ro Wei Bing, juna aktiva s-ano. Pro la malalta eldonkvanto de 2000 ekz. ĝi estas malfacile havebla. Mi vidis la stampon ĉe Hirsch. Nun nia Ĉin Kajĝi skribis al mi pri ĝi. Koran dankon!

***

Instruista festo

Dum pli longa tempo jam mi havis ĝin, sed hezitis skribi pri ĝi. Nun Ĉin Kajĝi konfirmis ĝian poŝtecon. Desegninto de la stampo estas Zhang Yuanqing. Daton kaj urbonomon certe ankaŭ vi ne trovos en la stampo – se vi ne estas ĉino. La stampo estis uz-ata en 89.09.10 en urbo Weihui, prov. Henan.

***

Filatela ekspo en Nanĉang

Lastsekunde atingis min, sendita de Cao Xionglin, tiu ĉi filatelaĵo. Por bonvenigi la 130an datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof okazas Esperanto-filatela ekspo en la Nanĉang-a Laborista Kultura Domo en 4-10 nov 1989. La Pm-kompanio de Nanĉang eldonis Esperantan memorkoverton kaj stampon. Desegnis: Zou Ŝjaucing. Sur la koverto mi tamen trovis du stampojn, dum Xionglin skribas pri nur unu. Ambaŭ stampojn mi montras titolpaĝe. Dankon pro la alsendo! Gratulon pro via aktiveco!

***

Ĉinaj stampoj en 1989

89-1 Changshu	jan 05	Serpenta jaro
89-2 Hangzhou	jan 05	Serpenta jaro
89-3 Maanshan	jan 05	Serpenta jaro
89-4 Nanchang	jan 05	Serpenta jaro
89-5 Weihui	jan 05	Serpenta jaro
89-6 Maanshan	apr 24	Liberigo
89-7 Changshu	apr 25	Liberigo
89-8 Ningbo	maj 03	Rata festo/Arta festo (05 23)
89-9 Ninghai	maj 04	4a-majo-movado

-10	Nanchang	maj 22 Fila ekspo -sms
-11	Kajfeng	jun 29 IPU
-12	Ninghai	jun 29 IPU
-13	Maanshan	jun 29 IPU
-14	Changji	jul 26 Fila ekspo Bajingke
-15	Ninghai	jul 30 Inundo
-16	Changshu	sep 28 Konfuzeo
-17	Kajfeng	sep 28 Konfuzeo
-18	Nanchang	sep 28 Konfuzio (eble 2)
-19	Ninghai	sep 28 Konfuzeo
-20	Weihui	sep 28 Kongzi
-21	Changshu	sep 29 2a Kulturarta festivalo
-22	Changshu	okt 01 40 jaroj PRĈ
-23	Qingdao	okt 05 Filmo „La Espero"
-24	Nanchang	okt 08 Turo Princo Teng
-25	Weihui	okt 09 5a Instruista Festo
-26	Nanchang	nov 04 Fila ekspo Cao (ov k folioforma)

Atentu: Pro ofte nekonkreta informado ne eblas, nun doni katalogajn numerojn. Ekz. Nantong kaj Hohhoto stampoj montriĝis nepoŝtaj. De n-roj 89-18 kaj 89-26 estis raportitaj nur po unu stampon, sed alvenis po du diversaj...

Baldaŭ aperos:

Datreveno de naskiĝtago de Zamenhof en 6 kaj pli da urboj
Okcidenta lago Hangzhou en Hangzhou
Ĉevala jaro en pluraj urboj
EPĈ — 40 jaroj en Pekino (unua de majo 1990).

Nuligu en katalogo '89: Nantong kaj Hohhoto, ekde Hohhoto nova numera ordo: Changshu SJ estas n-ro 83.

Korektu: 39-3 anst. Dingshan: Yishan — Jiŝan
39-12 anst. Pingjie: Pingguo — Pinggŭo.

***

KEK en Bulgario (BU 24)

KEK (Komunista Esperanta Kolektivo), estas internacia organizaĵo de esperantistoj, kies ideologia bazo estas marksismo-leninismo. En la bulgara Ruse okazis 24-27.8.1989 la „6a INTERNACIA KONFERENCO DE KEK". Tiel tekstas poŝta stampo kun Esperanto-stelo en ĝi. Koran dankon al sinjorino Olga Cankova pro senditaj informoj.

***

49a hispana Esperant-kongreso (HI 31)

Nia kluba amiko Emilio Folgado Lopez informis pri memora stampo

okaze de tiu kongreso. La stampo tekstas: 49 HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO — EXP FCA, BILBAO, 19-21 Julio 1989. En la mezo pozas kvinpinta stelo kun monumento honore al Diego Lopez de Haro, kiu fondis en la 13a jarcento Bilbao-n. La loka Esperanto-klubo aperigis memoran koverton, same la firmao Alfil. Loka klubo ankaŭ eldonis karton kun kongresa afiŝo. Kiel informas la loka klubo, la stampoj haveblas kontraŭ po du guldenoj. Adreso: Grupo Esperantista de Bilbao, Barrencalle Barrena 7, 1a dcha, E-48005 Bilbao.

***

Festotagoj en ĈSSR (CS 21)

„FESTOTAGOJ OMAĜE AL 20. DATREVENO DE ĈEA", tiel tekstas Esperanto-stampo el HAVIROV 1 kun la dato 25.8.1989. Supre du vizaĝoj, de Zamenhof kaj Bezruč, silezia poeto. La organizintoj eldonis memoran koverton kun la stampo-desegnaĵo en la ora. Aŭtoro de la stampo estas la esperantisto prof. Jaroslav Hradecky el Jablonec. Bezruč ne estis esperantisto, sed de liaj verkoj ekzistas multaj Esperantaj-tradukaĵoj. Dankon al nia kluba amiko Vlastimil Kočvara pro la informoj!

***

JES en Leipzig (GDR38)

23-25.6.1989 okazis en Leipzig, en la kadro de la Agrikultura Ekspozicio „agra 1989" la Jarmeza Esperanto-semajnfino. Partoprenis 250 personoj el 11 landoj. La ekspozicia estraro aperigis plurajn materialojn en Esperanto, i.a. la tre belan poŝkalendaron kun papilio (grafikisto: Joachim Schulze). La poŝtejo de Leipzig 1 uzis 23.6-22.7.1989 memoran stampon kun la JES-emblemo kaj Esperanta teksto (grafikisto: Joachim Schulze).

***

Esperanta-filatela ekspo en Koreo

Prof. d-ro So Gilsu, nia kluba amiko en la korea respubliko, Seulo, sendis belegan filatelaĵon, nome Esperantan memoran koverton pri la „dua e-filatela ekspozicio" kiu okazis inter 14 kaj 20 oktobro 1989 (4322) en la grand-magazeno Hyundai en Seulo. La koverto montras muzikantajn infanojn. La stampo posedas supre cititan tekston, ankaŭ en la korea, kun bubo en la mezo. La stampo estis uzata de 1989-10.14 ĝis 1989.10.20. Koran gratulon al nia korea amiko!

***

25a pola kongreso (PO 134)

XXV POLSKI KONGRES ESPERANTA tekstas la ronda stampo de

Białystok 1. La internon okupas ronda terglobo kun granda E. Sub tio la dato: 1989.07.15. Koran dankon al nia kluba amiko Lech Kosieniak pro la sendita stampo.

***

IJS en Hungario (HU 111)

El la hungara urbo Szolnok atingis min, sendita de nia Fekete, salutkarto kun Esperanta stampo „INTERNACIA JUNULARA SEMAJNO/IJS". Dato: 1989.07.09. Dankon al vi, Stefano!

***

UK kaj SAT-kongreso 1989 filatele nulaj

Nek en la brajtona nek en la ilertesena kongresoj de SAT kaj UEA oni kapablis filatele ornami la kongresojn. Esperanto pro tio ne pereos, sed restas truo en la laŭvica filatela dokumentado, kvankam ambaŭ kongresoj okazis en ekonomie riĉaj landoj.

***

Hohhot-a stampo nepoŝta (Serpenta jaro)

Danke al informoj de nia Ĉin Kajĝi nun certas, ke la serpentjara stampo de Hohhoto estas nepoŝta. La koncernan stampilon uzis la Esperanta Asocio de Interna Mongolia Aŭtonoma Regiono, senhezite ankaŭ sur poŝtaj tutaĵoj! La tute samaspekta de Ma'anshan tamen estas poŝta, ĉar uzis ĝin la M-a poŝtmarka kompanio.

***

La grafikistoj Chen Minggang kaj Zhang Yuanqing

Ambaŭ jam desegnis plurajn Esperantajn stampojn, sed ili ne estas esperantistoj. Meze de 1989 ambaŭ kontaktis nian Ĉin Kajĝi kaj esprimis la deziron lerni Esperanton. Li donacis al ambaŭ lernolibrojn kaj nun esperas, ke ili efektivigos tiun deziron por ke ili fariĝu esperantistoj kaj pli energie laboru en la Esperanta filatelio, kiel tion jam praktikas nia amiko Zhang Linrui.

***

Jixian nun Weihui

Antaŭ kelkaj monatoj la urbonomo Jixian ŝanĝiĝis al Weihui. La jubilejaran kaj serpentjaran stampojn de Jixian/Weihui desegnis Zhang Yuanqing, instruisto en la gubernio Weihui.

Ni en ekspozicioj

Changji

S-ro Ba Jingke en kadro de filatela ekspozicio la 26an ĝis 28a.7.89 en Changji montris ekspozaĵon kun 400 paĝoj, inter ili

56 pri Esperanto. Ni gratulas!



Hangzhou

S-ro Shen Minglun kuraĝis partopreni per ekspozaĵo la filatelan ekspozicion 1989 de provinco Zhejiang kaj tuj sukcesis per tria-grada premio. Antaŭ 1987 li neniam okupiĝis pri filatelio! Nian koran gratulon al li!



Erinofila ekspozicio

Nia kluba amiko Richard Hirsch ekspozis sian erinofilan ekspozaĵon en ekspozicio kaj akiris pro ĝi medalon en ora rango. Gratulon!



Nacia poŝtmarko-ekspozicio 89 en GDR

Mi partoprenis per mia ekspozaĵo tiun plej altrangan ekspozicion kaj ricevis por ĝi medalon en rango de „granda vermejlo". Titolo de la ekspozaĵo: „El la historio de Esperanto".



Interregiona ekspozicio Macerata

Nia nova kluba amiko Alessandro Bellucci en junio '89 partoprenis kiel nova kolektanto la ekspozicion kaj „per la unua bato" tuj akiris bronzan medalon! Gratulon! Krome li partoprenis kun sia Esperant-filatela ekspozaĵo la 6an urban filatelan ekspozicion en „Kastiljono de la Peskaja" en julio '89. Dankon pro la sciigoj!



Impona E-filatela ekspozicio en Seulo

Vere pompan ekspozicion iniciatis kaj preparis prof. d-ro So gilsu. Danke al granda helpo de la ĉiovendejo Hyuindai kaj de s-ro Nam li povis okazigi Esperanto-semajnon en la ĉiovendejo. Li sukcesis elmontri 38 fenestrojn kun Esperanto-filatelaĵoj kaj krome aliajn esperantaĵojn. Forte impresis min la luksa multkolora faldfolio pri la ekspozicio. En la kadro de la ekspozicio okazis prelego pri Esperanto en turismo. Notindas, ke post la ekspozicio la ĉiovendejo organizis Esperanto-kurson. Tiu ĉi ekspozicio valorus multajn liniojn, sed mi devas pro manko da spaco draste limigi mian entuziasmon. Dankon al nia samideano So gilsu. Pardonu: ankoraŭ unu aferon mi devas proksimigi al vi: sekvontjare So gilsu havus eblecon samloke okazigi internacian E-filatelan ekspozicion. Sed por tio necesas kunlaboro de alilandaj filatelistoj! Se vi povas tion, bv. kontakti lin: prof. d-ro So gilsu, Korea respubliko, Seulo, ROK-158 600, P.O.Box 11.